



8-6-1974

CGC Nº
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73 Caixa Postal 07 - 1182
Telefone 4-8033
11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090
70.000 - Brasília (DF)

BOLETIM Nº 34

ABRIL DE 1978

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

REDAÇÃO: MARIA ALMADA

KIEL VENKIGI ESPERANTON UNUA BRAZILA TEZO

Ofte la esperantistaro starigas la timigan demadon al si:—Kiel venkigi Esperanton? Kaj la plej kuraĝaj kaj batalamaj faras planon kaj ekagas sur diversaj kampoj por antaŭenpuŝi la ideon de Zamenhof.

La persono sidone laboras, pagas el sia propra poŝo la elspezojn kaj post kelka tempo rimarkas, ke la tuta klopodo estis vana. Multaj el ni elrevigas, forlasas la batalon kaj ofte eĉ la movadon, ĉar ne realiĝas la sonĝo venkigi la internacian lingvon.

Nur malmultaj starigas al si la demadon: Ĉu mi efike agis? Ĉu mi ne komenkis tro altnivele, aŭ netaŭĝe mian propagandon kaj laboron? Kompreneble, ĉiuj ni juĝas nian agadon bona, do ni tuj akuzas la homaron aŭ eĉ Esperanton mem pro nia malsukceso.

Ĉiuj niaj gesamideanoj deziras la sukceson de Esperanto. Pro ĝi multaj el ni laboras eĉ laboregas, la plej ofte vane.

Esperanto estas naŭdek jaraĝa. Ĝia historio komparata kun la naciaj lingvoj estas juna, sed jam plenkreska, kaj postulas lokon por si en la mondo.

La luta esperantistaro venis al konkludo, ke oni devas enkonduki la internacian lingvon en la lernejojn, kaj precipe en fakultatojn, se ni deziras venkigi ĝin oficiale. Ho! Jes, sed tio ne estas facile realigebla. Kelkaj bonintencaj batalantoj fojfoje sukcesas organizi kursojn, sin dediĉante al tiu laboro, sed la studenta-

ro ne havas tempon por lerni Esperanton, ĉar ili bezonas lerni la abundajn lernobjektojn, por ne perdi la jaron ĉe la fakultato, kaj la kurso post kelkaj semajnoj finiĝas pro manko de gelnantoj, je granda seniluziigo de la profesoro.

Nia vicprezidento Prof-ro José Passini el Juiz de Fora (MG), jam plurfoje travivis tiajn spertojn dum sia esperanta vivo kaj venis al la konkludo, ke tiel ni neniam sukcesos venkigi Esperanton.

Ne perdinte tempon li, post multe da batalo, sukcesis konvinki la direktoraron de la Beletra Fakultato de la Federacia Universitato de Juiz de Fora akcepti Esperanton kiel devigan kaj oficialan lernobjekton, kio finfine okazis, kiel ni siatempe informis, laŭ la Rezo-lucio 15/76, de la 4-a de junio 1976.

Depost tiu grava decido Prof-ro Passini sin dediĉis al preparado de tezo, kiun li defendis ĉe la Pontifika Universitato Katolika de Rio de Janeiro, ricevinte la titolon de magistro (la unua en Brasil!). kaj tiel li jam decidis ekinstrui Esperanton depost la venonta aŭgusto. Lia tezo estis tre interesa. Li faris komparon de Esperanto al kvar planitaj lingvoj (Volapuko, Ido, Ocidental kaj Interlingua, kaj la natura Portugala). En tiu ĉi laboro li reliefigas la solvojn, kiuj plej multe efikas ĉe la problemoj, kiujn alfrontas la planita lingvo cele al komunikado internacia.

Ni sincere kaj tre varme gratulas Prof-ron Passini pro tiel entuziasmiga laboro, kiu ebligas prepari estontajn profesorojn por nia kara afero.

Tiamanieri li estas la unua Prof-ro gvidanta devigan kaj oficialan Esperanto-kurson en Brazilo.

Li klare indikos la certan kaj korektan vojon al la esperantistaro, kiel venigi la Zamenhofan idealon.

Por ni estu s-ano José Passini brila ekzemplo, ĉar li kuraĝe kaj ne flankigante sekvas la vojon celitan.

Al nia karega vicprezidanto kaj senlaca kunlaboranto Prof-ro Passini, ni ankoraŭfoje gratulas kaj deziras plenan sukceson.

☆☆☆☆☆

Juiz de Fora (MG) — Nia prezidanto, vizitinte Juiz de Fora, estis intervjuita de la redaktoro de la taga gazeto "LEIA", informinte pri la Latinamerika Kongreso de Esperanto, okazonta de la 17-a ĝis la 22-a de julio venonta, en Marilja (SP).

☆☆☆☆☆

S. Sebastião do Caf (RS) — Nia vicprezidanto George Otto Vaske informas nin, ke li kun kelkaj samideanoj partoprenis la 38-an nacia kongreson de Esperanto de Argentino, kie li faris grandan propagandon pri nia Latinamerika Kongreso, okazonta en Marilja (SP), invitinte multajn el la partoprenintoj ĉeesti ĝin amase. Krom tio s-ano Vaske spertis bonan instrumentodon por Esperanto, kiun li certe kaj multaj instruistoj eluzos en siaj kursoj. Gratulon, s-ano Vaske!

☆☆☆☆☆

Gazetoj Ricevitaj

Ni ricevis kaj dankas la jenajn, kiuj sen escepte, informas pri Esperanto: "Correio Fraternal do A.B.C.", Informilo do S.E.K., "O, NO-SSO", "O Espírito Mineiro", "Rio Grande", "Boletim de Psicologia", BEJO-Informas, Informilo SAK, ESCOL, "Correio do Povo", Uber Shopping e Boletim da Ass. Pernambucana de Esperanto.

☆☆☆☆☆

MONO RICEVITA

Ni ricevis por nia bulteno la jenajn

sumojn, kiujn ni el tuta koro dankas:
Majoro Gilberto A. Silva Velho . 150,00
Prof-ro José Passini 200,00
George O. Vaske 50,00
Antonio J. F. Padilha (poŝtmarkoj) 40,00
Tuto 440,00

☆☆☆☆☆

BAURU (SP) — Nia s-ano Antonio João Fraga Padilha informas, ke en Bauru la "Escola Progresso" organizas kurson pri Esperanto inter aliaj. Gratulon!

☆☆☆☆☆

Brazilio (FD) — Nia Ĝenerala Sekretario, Prof-ro Nelson Pereira de Souza, informas nin, ke en nia ĉefurbo ekfunkcias ĉirkaŭ dek kursoj pri Esperanto. Li gvidas kelkajn el ili, inkluzive progresigan por tiuj, kiuj volas perfektigi sian konon pri la Internacia Lingvo. Li jam preparas esperantistojn por la estonta Kongreso Universal, okazonta en la jaro 1981-a. Li estas unu el la plej kompetentaj gesamideanoj en Brazilo. Ni kore gratulas lin, dezirante sukceson.

☆☆☆☆☆

UNIVERSIDADE FEDERAL DE BRASÍLIA — Em carta dirigida ao nosso presidente o universitário Alexandre Nominato solicitou informações detalhadas sobre a Língua Internacional Esperanto, a fim de proceder a uma pesquisa determinada pela diretoria da Universidade de Brasília, como roteiro de trabalho, visando aclarar as "idéias um tanto apagadas e obscuras que se tem sobre uma língua auxiliar internacional; como é encarado o seu estudo, sua validade, sua funcionalidade, destacando, justamente, os movimentos locais e regionais, cursos e atividades desenvolvidas pelos estudiosos da língua, etc., o que constituirá parte básica do texto".

Enviamos-lhe o livro do nosso vice-presidente Dr. Walter Francini — "Esperanto sem Preconceitos" e "Esperanto Elementar" de nosso presidente, pelos quais poderá conseguir muitos informes e obter conhecimentos básicos para o aprendizado do Esperanto, além de fornecer outros dados úteis ao seu

trabalho.

☆☆☆☆☆

Porto Alegre (RS) — Nosso vice presidente Dr. Modesto Belmonte de Abreu continua trabalhando incansavelmente no sentido de propagar o Esperanto, publicando colaborações de sua lavra no Correio do Povo de Porto Alegre, sob o título "Esperanto no Mundo". Em seu último artigo ele se referiu ao 62º Congresso Universal de Esperanto, acontecido em Reykjavik (Islandia), tratando pormenorizadamente da sua Resolução, com reprodução de diversos itens. No final, com relação ao tópico "O Direito de Comunicação", item 11 diz: "UNESCO E ONU —devem explorar novos procedimentos, inclusive a possibilidade de utilizar a Língua Internacional para documentações e interpretações a fim de possibilitar a plena realização do direito de comunicação oficial entre Estados Membros, sem discriminação linguística".

☆☆☆☆☆

Sorocaba (SP) — Ocorrerá no próximo dia 30 em Sorocaba, promovido pela Associação Paulista de Esperanto e Sorocaba Esperanto-Klubo, patrocinado pela Prefeitura Municipal de Sorocaba (Secretaria de Educação e Saúde e Serviço de Difusão Cultural), um encontro Regional de Esperanto para o qual são convidados todos os esperantistas do Brasil. Haverá exposição de selos, jornais e revistas, bem como palestras, filmes e debates. Serão entregues prêmios (livros) aos autores dos melhores trabalhos sobre divulgação do Esperanto.

Do evento participará o presidente do BKE, prof. F.S.Almada, que abordará o tema "O Esperanto no Brasil e no Mundo". Rogamos a todos os nossos coidealistas sugestões sobre a maneira de divulgar o Esperanto, pois que essas sugestões serão julgadas e possivelmente utilizadas. Aguardamos o comparecimento massivo dos nossos coidealistas em Sorocaba no dia 30 de abril próximo. Local: Gabinete de Leitura Sorocabano, Praça Fernando Prestes, 21 (Centro).

☆☆☆☆☆

LINGVA PRIKOMENTO (D.W.) — Argentino

les tenatan korpoparton oni signas per "per": Konduki iun per la nazo. Sed ĉar tiel povas esti dube, ĉu ne temas pri la tenanta korpoparto, oni uzis "ĉe": Konduki ĉe la nazo; li kaptis la junulon ĉe la kolo. Sed, ĉar "ĉe" povus signifi ankaŭ, "apud", Zamenhof fine uzadis "je" por la tenata korpoparto, kontraste al "per" por la tenanta. Ekz: Subite ŝi ekkaptis per ambaŭ manoj du belajn florojn ĉe sia flanko; poste ŝi prenis sian filon je la mano; ŝi eksentis, ke oni tenis sin je la brako; ŝi tenis la kolombon je la piedoj. Tiel oni povas tute klare distingui: Ŝi falis, sed ekkaptis min per la manoj je la piedo. Per la prepozicio "per" oni signas ankaŭ ŝion, kion oni povas rigardi kiel rimedon por atingo de celo, efektivigo de ago, ekz: Per kio vi vivas (ne, "de"); kompreni per helpo de vortaro; servo kvitiĝas per reservo; eldevigi permeson per senĉesa ripetado; turmenti iun per malsato; veti per mono; ekkoni iun per la nazo; "Per" oni uzas ankaŭ por signi personon, kiun oni uzas por efektivigo de ago: sendi leteron per servisto; ŝi pentrigis sian portreton per fama artisto. La instrument-adjekton oni povas signi ankaŭ per aliaj prepozicioj, ekz. per "el": Designi el la memoro; ami el la tuta koro; paroli el sperto; sciigi pri io el la gazeto; vivi el ŝparita mono; ankaŭ per prepozicio "sub" ekz: malpermesita sub severa puno; sub tiu ĉi signo vi venkos; per "sur" — Kalkuli sur fingroj; ludi sur violono; oni uzas ankaŭ "Kun" anstataŭ "per" ekz: Kun la formo nova oni elpuŝos la malnovan. "Pere" oni uzas en jenaj okazoj: fari negococon pere de agento; geedziĝi pere de gazononco, aŭ svatisto. Oni uzas "helpe de" en jenaj okazoj: li aranĝis la festenon helpe de tri klubanoj; instrui helpe de la Ĉe-Metodo. Ofte oni povas esprimi la instrument-adjekton per adverbo: informi letere; bati marteles; vidi sonĝe; mortigi pafe. La aĉet-prezo, kiu estas propre rimedo por akiri la aĉetotan objekton, estas esprimata tamen ne per "per", sed per "por": mi aĉetis la libron ne "per" kvin frankoj, sed por kvin frankoj.

☆☆☆☆☆

Rio de Janeiro (RJ) — Fakultato Estácio de Sá — Samideanino Elma do Nascimento, el Rio de Janeiro — Meier — informas, ke estis kreitaj kursoj de Esperanto en la Fakultato Estácio de Sá, gvidataj de ŝi. Kaj ke la programon konsistigas tri Kategorioj: Baza, Daŭriga Kaj Supera Kursoj, kaj ke ili okazas lunde, marde, merkrede kaj ĵaŭde, de la 18-a ĝis la 19-a horo. La Fakultato mem sin oferis por propagandi pri tiuj kursoj en la plej gravaj gazetoj de Rio de Janeiro. Tiel estas Baza Kurso de Esperanto ĉe Rua do Bispo, 83, Tijuca, Rio de Janeiro (RJ) — Faculdades Integradas Estácio de Sá.

☆☆☆☆☆

Salvador (BA) — Informa-nos nosso vicepresidente Raimundo José Pitanga Rocha, que no dia 31 de março último foi promovida uma palestra sobre "Superação da Barreira Linguística nas Ciências" pelo Professor Elmar Frank, no Instituto Geográfico e Histórico da Bahia. Foi proferida em Esperanto, sendo patrocinadora a Associação Bahiana de Esperanto. 2) Projeto para lançamento em fins de março passado da revista "Bahia Esperantista". 3) No dia 18 de março houve uma entrevista na televisão "Itapoá", realizada com os professores Sergio Pastori e Adail Sobral sobre "Importância do Esperanto no Mundo Moderno". 4) A Associação Bahiana de Esperanto encontra-se em plena atividade com 18 professores trabalhando nos turnos vespertino e noturno, em vários horários. 5) Encontra-se hospitalizado em Joazeiro o Prof. Hermes Pita, cujo restabelecimento esperamos com ansiedade. 6) Enviou-nos, ainda, nosso colaborador recorte do jornal "A Tarde" onde se publicou o artigo "Será sonho da Humanidade falar uma língua comum?". Gratos pelos informes e parabéns aos valerosos bahianos pelo seu magnífico trabalho, digno de ser imitado.

☆☆☆☆☆

JUNULARA ANGULO

Ĉiam kun granda plezuro ni legas la sciigojn pri BEJO-agado. Laŭdinda estas klopodo de niaj karaj junuloj André Luis de Souza, el Niterói, Kaj Ciro Gomes de

Freitas. André Luiz jam bone konata kaj estimata pianisto, instruisto kaj organizanto en BEJO-movado. Estis li, kiu perĝajnis la monon por la disdonitaj premioj de la muzikfestivalo en Santos en la pasinta jaro. Estis li, ankaŭ, kiu organizis la unuan BEJO-renkontiĝon en Niterói, Kaj nun sin preparas por la Latinamerika kongreso, kie li prezentos novajn muzikojn.

Ciro Gomes de Freitas, siavice, organizas BRATEG (Brazila Teatra Esperanto-Grupo) por la sama kongreso. Néia Lucia Souza anoncas en la Bulteno de BEJO la ĉijara kampanjo por elekti la Fraŭlinon Esperanto. La novaĵo estas, ke ĉijare verŝajne oni elektos ankaŭ "Fraŭlon Esperanto". Estas laŭdinda laboro de niaj junuloj, elstarigante la plej bonajn lernantojn. Ni Kore gratulas la agmanieron.

La dua regiona renkontiĝo de BEJO okazos en februaro 1980-a en Gojania, organizota de nia vicprezidanto Vicente Caetano, same klopodema junulo, kies kantmaniero meritis specialan premion de BEK dum la muzikfestivalo en Santos, okaze de 1a 12-a Seminario de Esperanto la pasintan jaron.

Krom muziko, sporto, lernado, la junularo havas ankaŭ ŝakorganizaĵon en sia kadro. Tiu, kiu ludas ŝakon kaj interesiĝas pri ĝi volu sin turni al S.E.K.-Kasisto, Sano José Leandro Caldeiras Bruzquez, Poŝtkesto 53, CEP 37.200 — Lavras - MG.

Aniĝu ni amase al BEJO kaj helpu niajn klopodemajn gejunulojn; ili estas la futuraj gvidantoj de nia movado. Kotiztabelo estas: Abonanto — Cr\$ 50,00; Subtenanto Cr\$ 100,00 — malpli ol 30 jara. Protektanto — Cr\$ 100,00; Patrono — Cr\$ 200,00 — pli ol 30-jara.

Ni gratulas al BEJO ĉar neniam antaŭe okazis tiel ampleksa programo ĉe la junulara movado kiel nun kaj la plej grava fakto estas, ke ĝi estas organizata de ili mem, kaj ĉion, efektivigas. Ankoraŭfoje, gratulon! Vi meritas ĉies apogon! Antaŭen!

☆☆☆☆☆

Brazila Sekcio de Ilei — (Internacia Ligo de Esperanto Instruistoj) — Laŭ cirkulero de tiu organizaĵo al sia peranto en San-Paŭlo, F-ino Elvira Fontes, sekretariino de la Brazila Departamento de ILEI, okazos monda ekspozicio de infanaĵ desegna-

ĵoj en Parizo dum la internacia jaro de la infano (1979), en la halo de UNESKO, kaj poste, eventuale en Internacia Kultura Centro-Pompidou. Jen la specifaj temoj de la ekspozicio:

1) Infanaĵoj vizaĝoj el la tuta mondo; 2) Infanoj ludas kaj sin okupas; 3) Infanoj ĉiam lernas; 4) Infanoj manĝas; 5) Infanoj malsatas; 6) Infanoj en la hejma vivo; 7) Kiel infanoj vidas plenkreskulojn; 8) Kion infanoj plej deziras; 9) Infanoj aktoras; kaj 10) Kiel infanoj festas. PROCEDURO —

1) La temoj povos esti solvitaj per fotoj kaj desegnaĵoj; 2) La plej granda formato estu DIN 5, la plej malgranda — DIN 4; 3) Ĝis la 30-a de Septembro 1978 estu la materialo ĉe mi; 4) Post la pariza ekspozicio la materialo estos je dispono de pluaj ekspozicioj en la mondo; 5) Ĉiuj afiŝoj sub la ekspoziciaĵoj estu dulingvaj (naciligve-Esperanto); 6) Ĉiu infano kiu kontribuos per desegnaĵoj aŭ fotoj, ricevos donace bildkarton pri la ekspozicio".

Oni petas traduki ĉi tiujn informojn kaj aperigi en la naciaj gazetoj cele al ricevo de kontribuoj de la brazilaj infanoj partopreni en tiel bela iniciato. Ankaŭ oni petas diskonigi tiujn informojn ĉiamaniere por ke tra la tuta Brazilo ili estu sciigitaj. Klarigo pri tiu "DIN". — DIN 3 = 297 mm x 420 mm; DIN 4 = 210 mm x

297 mm.

☆☆☆☆☆

Deziras Korespondi — El Japanujo: F-ino Jafune Kajo — Komagaua-ĉo 5-4, Higasi Sumijoŝi-Ku — OSAKA 546 — (16-jara ŝtatoficisto); S-ro Seiiĉi Etoo 4-20-12 Jkejiri Selagaja, '182 TOKIO (Emerita ŝtatoficisto); S-ro Kazuo Ogaua - 2-52-3 Kikunodai, Ĉoofu-ŝi, 182 TOKIO (Apo-tekisto); F-ino Toŝiko Fujiŝima — 1-1-26-103 Nakameguro, Meguro-ku - 153 TOKIO (Oficistino); F-ino Teruko Hirano Nishi 2-8-4 Ebisu, Shibuya 150 Tokio (Oficistino); F-ino Jumi Ogita - 3-3-4 Simotakaido, Suginami-ku 168 TOKIO (Studentino).

☆☆☆☆☆

D-ro Humphrey Tonkin — Nia prezidanto ricevis kortuŝan leteron de D-ro Tonkin: "Mi skribas al vi tute mallonge por danki vin pri via daŭra alsendado de la Bulteno de la Brazilia Konsilantaro de Esperanto, kiun mi legas kun granda intereso. Mi gratulas vin pro via efika laboro en Brazilo, kaj deziras al vi bonan sukceson en la estonteco".

☆☆☆☆☆

☆☆☆☆☆

ESPERANTO ELEMENTAR — Tem tido grande procura o livro de nosso presidente que se encontra à venda nas seguintes livrarias: São Paulo Esperanto Asocio — Av. São João, 1333 — 2ª conj. 21; Cooperativa Cultural dos Esperantistas, Caixa Postal Nº 1.887, ZC 00 — 20.000 Rio de Janeiro (RJ); Liga Uberabense Esperantistas, Rua Sete de Setembro, 28 — CEP 38.100 — Uberaba (MG) e Centro Esperantista de Santos, Rua Galeão Carvalhal, 31 aptº 73 — CEP 11.100 — Santos (SP).

CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

BALANÇO GERAL EM
31-12-77

ATIVO

I — Disponível

CAIXA

Em Brasília (DF)	861,39	
Em Santos (SP)	1.966,70	2.828,09
Em Bancos	2.001,02	4.829,11

II — Realizável

Bens recebidos (doação)	910,00
-------------------------	--------

III — Imobilizado

Objetos de Escritório e Impressos	437,75
---	--------

6.176,86

PASSIVO

I — Não exigível (Fundo Social)	6.176,86
---	----------

6.176,86

DEMONSTRATIVO DA CONTA DE RECEITA E DESPESA

DÉBITO

Despesas Gerais	10.960,40
Superavit transferido para "Fundo Social"	2.350,00
	13.310,70

CRÉDITO

Contribuições	
recebidas	10.860,00
Rendas Diversas	2.450,70
	13.310,70

F. S. Almada
Presidente

Nelson P. de Souza
Secretário

Carlos A. S. Cunha
Tesoureiro
CRG. S. DF. Nº 360
CRG. SP Nº 43051